



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

ENHAVO n-ro 38 • AMO 87 • Norvegio • Universitatoj • Subotica < julio 16

Baltiaj Eo-Tagoj (BET) ekis kun pli ol ducent homoj

La urba koncerta salono de la litova urbo Klaipeda liveris la lokon por la solena inaŭguro de la 56a sesio de BET. La kongreso okazis sub la protekto de la urbestro de Klaipeda, la tria plej granda urbo de Litovio. Estis registritaj 238 partoprenantoj por BET, venintaj el 31 landoj, laŭ la informriĉa programkajero. La kongreso mem okazas en la urba universitato, kiu mem havas longan historion. Estante havenurbo, la loko bone rilatis tra la jarcentoj kun aliaj landoj. Tamen la nuna universitato estis fondita antaŭ nur tridek jaroj.

La ceremonion gvidis Povilas Jegerovas, kiu post bonvenigaj vortoj enkondukis la nau prezentantojn. Unue, la prezidanto de la loka klubo laŭlegis diversajn skribajn salutojn al la kongreso. Post tio salutis kun traduko La vic-rektoro de la universitato. Sekvis la vico de UEA, kies prezidanto salutis, dirante, ke li estas la unua prezidanto de UEA por partopreni en BET kaj kial la baltia regiono gravos por UEA. S-ino Birute Rozenfelde el Latvio rakontis detale pri la fonda de BET en 1959 komence kiel plejparte junulara tendaro en veraj tendoj.

Tonu Hirsik salutis por la estona Movado, kaj Maragreta Zelve por la latva esperantistaro. Fine salutis Amri Wandel, kiu dum BET organizas sesiojn de AIS kaj SUS – sciencaj kunsidoj. Laste salutis Ulrich Brandenburg, la prezidanto de la germana landa asocio. Li, estinte diplomato en Moskvo, povis bone rakonti pri la partopreno de rusaj esperantistoj en BET, kiu per tio pontis inter oriento kaj okcidento, rolo, kiun oni espereble povos iam restarigi.

Kutime BET alternas regule inter la tri baltaj landoj, sed pro la deviga pardemia paŭzo de precize tri jaroj, okazis la stranga stiuacio, ke okazis en Litovio du sinsekvaj BET.

Post la ceremonio sekvis koncerto de blovorkestra kvinteto, kiu transportis nin de barokaj tempoj ĝis la nunaj tagoj, reprezentitaj de du verkoj de norvega komponisto, por kiu la sesa muzikisto alvenis elektronike.

Ni raportos pli detale en postaj tagoj, kune kun fotoj, kiuj cetere jam troveblas abunde en la reto. Sekvos raporto pri la Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) okazonta en la 14a kaj 15a de julio.

SMG

Norvega estonto sub vasta diskuto

La estraro de NEL kuraĝe frontis la estonton de la nacia asocio tra la sekvaj jaroj, kaj starigis diskutadon inter la nekreskanta membraro. La asocio eltenos unu/du jarojn el rentoj, sed poste ili devas fronti la eblon redoni la delongan sidejon, kiu entenis bibliotekon, informcentron. Oficejon de NEL kaj renkontiĝejon por la loka klubo. La diskuto temos pri alternativaj planoj por tiuj funkcioj, se la sidejo devos malaperi. La Asocio planas daŭrigi la retajn kursojn, servojn al la membroj, kaj daŭra maniero eldonigi la revuon, kiu donis la fonton por ĉi tiu teksto.

Interkulturaj kapabloj prezentitaj al internacia konferenco

La Monda Kongreso de FIPLV (Federation Internationale des Professeurs des Langues Vivantes) okazis inter 27-29. junio en Varsovio. Mia prelego „Developing intercultural competence through an intercultural language” (Evoluigo de Interkultura kapabligo per interkultura lingvo) estis bone akceptita.

Ilona Koutny

Plia internacia kongreso sur la fora horizonto

Kiuj konas la asocion **AILA** (Association Internationale de Linguistique Appliquée), International Association of Applied Linguistics? <https://aila.info/>

En Lyon, Francio, de la 17-a ĝis la 21-a de julio 2023 (do ĵus antaŭ la ILEI-kongreso en Italio) okazos AILA-kongreso <https://aila2023.fr/> – <https://aila2023.sciencesconf.org/>

DJ

Tajda fluso de latinamerika ritmo

Alta Tajdo kantas sian version de La Bambo, en televida programo de VITEC (Acoroj).

<https://youtu.be/igHEior9zGc>

mga

Subotica revenas al sia iama ekzamena elano

Inter la 18.06. kaj 03.07.2022. okazis RETAJ KER-ekzamenoj de UEA (laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro), la unuan fojon en tiu ĉi nova ekzamenformo (reta). **El Serbio partoprenis 2 junulinoj: 1 je B1-nivelo kaj 1 je B2-nivelo**, ambaŭ kandidatoj elektis nur la skriban parton de la ekzameno.

Ni atendas la rezultojn ene de du semajnoj. Sekvos informo pri tio.

Aranka

===== vortoj: 630 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Sendita el Klaipeda, Litovio, sen la helpo de la kutimaj kontrolantoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.